**Ĉieleniro de Jesuo** 17a de Majo 2007a (homilio de p. Héroux)

Dufoje, en la unua legaĵo kaj en la evangelio, ni aŭdis Lukon rakonti la saman periodon, la lastajn tagojn de Jesuo inter ni sur la tero.

En la Evangelio estas tre resume la 40 tagoj de instruo de Jesuo, inter lia releviĝo kaj lia ĉieleniro, kune kun la sendo de la Apostoloj. La unua legaĵo rakontas la samon pli detale, kaj daŭre rakontas la komencon de la Agoj de la Apostoloj, ekirantaj ĝis Romo, ĝis la fino de la tero por anonci ĉie al ĉiuj nacioj la Bonan Novaĵon de Jesuo.

Ni povas noti en la Evangelio du detalojn. Unue, « …adorkliniĝinte al Li … » : estas la unua fojo kiam ni aŭdas ke la disĉiploj ne plu dubas; ili ne plu pensas Jesuon nur granda profeto aŭ eĉ la Mesio, sed Sinjoro Dio, kiel diris Tomaso.

La dua detalo estas same mirinda : « post la adiaŭo ili revenis kun granda ĝojo » de la monteto Olivarba. Estas definitiva adiaŭo, sed ili ĝojas. Kutime estas iomete trista disiĝi, apartiĝi de konatoj, amikoj aŭ parencoj, eĉ se ni scias ke estas pli bone : junuloj devas iri eĉ eksterlanden por studoj, por laboro, pli kaj pli malproksime ; kaj gepatroj devas lasi kreskantajn infanojn lasi sian neston.

Ĉu ni prenos ekzemplon de nia hodiaŭa apartiĝo ? Pro aĝo (alia kaŭzo) mi ne plu estos spirita konsilanto de la Francaj Katolikaj Esperantistoj, sed mi sekvos la ekzemplon de mia antaŭulo, P. Bourdon, op. Antaŭ 15 jaroj, li lasis al mi la postenon. Poste mi iris al Lille celebri kun li lian centjariĝon, en septembro 2004. Li ne plu venis al kongresoj, sed li laboris esperante ĝis la fino. Mi laboros ankaŭ por la Sinjoro per Esperanto ĝis la fino, ĝis mia centjariĝo…se Dio volas !

Por la lasta fojo en tiu posteno, mi diros ankaŭ personan memoraĵon. Kiam mi iris kiel misiisto Afrikon en 1959, mi havis grandan surprizon. Lastfoje kun mia patrino, ni estis sur la kajo de la stacidomo por iri al Parizo, Bordozo kaj ŝipe al Afriko. Tempo de adiaŭo !

Nur en tiu momento mia patrino diris al mi ke mia vokiĝo kiel misiisto estis antaŭ mia naskiĝo. Ŝi klarigis : ŝi jam havis du filojn, kaj atendante trian infanon, ŝi esperis havi filinon, por ŝanĝi. Sed kiam ŝi vizitis tiam pilgrimlokon, maljuna misiisto predikis ke ofte vokiĝoj venas el la preĝoj de patrinoj. Do ŝi preĝis : «Sinjoro, mi deziras filinon, sed se vi volas pastron, mi akceptas ke tiu tria infano estu knabo ». Kaj tiel fariĝis : mi estis tiu tria filo kaj fariĝis pastro. Sed por respekti mian propran elekton, ŝi neniam parolis pri tio al mi antaŭ nia lasta adiaŭo.

Kaj ni adiaŭis iomete triste sed ankaŭ profunde ĝoje. Mi esperas renkonti ŝin denove tre ĝoje hejme, en la eterna hejmo, sed, se Dio volas, ne antaŭ mia centjariĝo: mi havas tiom da fari por la Sinjoro per Esperanto.

Niaj vivoj estas plenaj de renkontoj, de ŝanĝoj, de surprizoj, kaj disiĝoj. Ni disiĝu ĝoje, ĉiam sciante kien ni iras finfine: cele al nia eterna hejmo. Tie la Sinjoro Jesuo kaj nia Patrino Maria atendas nin, kune kun multaj gesanktuloj, ankaŭ kun multaj amikoj, parencoj, kiuj jam antaŭvenis tien per la mizerikordo de la Patro.

Kaj nun survoje ni memoru ke Jesuo diris « Jen mi estas kun vi ĉiujn tagojn ĝis la maturiĝo de la mondaĝo ». Ni helpu niajn gefratojn, esperantistojn aŭ ne, trovi Kriston kiu kondukos ilin al la vera vivo.

Ni iru kun ĝojo al la hejmo de l'Sinjor'.